

EVANGELIO DE JUDASO

Kion sciigas tiu evangelio? Laŭ la gnostika aŭtoro de tiu evangelio, Jesuo estas sendita por korekti erarojn plenumitajn en kaj pro la kreo de la homaro, kiu nur bezonas alĝustiĝojn kaj saviĝon helpe de la sanga ofero de Jesuo. Sed kiel Jesuo atingos sian celon? Elektante Judason kiel kaŭzanton de la morto de Kristo tiun ĉi liverante, per ŝajniga perfido, al liaj malamiko. Judaso komprenas la kvaliton de sia kunlaborado postulita de Jesuo, kiu antaŭanoncas al li la kondamnon flanke de aliaj apostoloj kiuj ne komprenas la mision de Jesuo. Judaso akceptas kaj fariĝas la sola kaj unika posedanto de la vero pri Jesuo kaj pri la kondiĉoj kaj destino de la diversaj supernaturuloj, bonaj aŭ malbonaj.

Inter tiaj superanturuloj elstaras la ĉielaj potencoj rondirantaj kun la kvin batalantoj... kaj per ili estos savita la generacio kiu antaŭis Sethon, nome tiu de Adamo.

Jesuo mem, kiu konfidas sian evangelion, devenas el la senmorta reĝolando de Bardelo: do eĉ li riveliĝas kiel dia estaĵo, kiu tamen originiĝas devenante el supera reĝolando. Sed li ne povas esti komparata kun la granda Dio.

Pri tiu evangelio aludas, krom iuj Ekleziaj Patroj, Sankta Ireneo, episkopo de Liono (Francujo) ek de 177 pK (Adversus haereses, I. 31,1) kiu sciigas ke la Eklezio ĝin ne akceptis, eĉ ĝin kondamnis: tial, tiu evangelio estis konata kaj diskutata ek de la dua duono de la dua jarcento. Ireneo skribis, ke laŭ tiuj adeptoj “nur Judaso, la perfidinto, konis la veron kiel neniu alia” kaj ke “pro

tio li realigis la misteron de la perfido, sekve de kio ĉio, en la tero kaj en la ĉielo, renversiĝis. Ili do produktis historion sur tiaj bazoj kaj ĝin nomis Evangelio de Judaso”.

Kiel oni scias, naskiĝis tiujn tempojn evangelioj apokrifaj fantaziantaj pri la Jesuo, sed doktrine korektaj kaj nur ne akceptitaj kiel kanonaj de la kristana komunumo, kvankam eble konigantaj ion historian pri Jesuo; naskiĝis plue evangelioj apokrifaj taksataj herezaj ĉar evidente proponantaj Jesuon tute alian ol la Jesuon de la kanonaj evangelioj.

Ĉu eblas ke tiaj malaprobataj, eĉ tiuj hereziĝantaj rilate la oficialan kredon, evangelioj povas esti enkalkulitaj inter la dokumentoj pruvantaj ion historian koncerne Jesuon? Ĉu ili konstituas kroman pruvon por tiuj kiuj tion eble ankoraŭ emas pensi ke li ne ekzistis aŭ ke la kredo pri la morto kaj resurekto estis vizio de la esperpostula komunumo? Certe jes, ĉar ĉiuj asertas ke Jesuo karne vivis, korpe estis krucumita kaj fine, preskaŭ ĉiuj, resurektis. En tio, ĉiuj koincidas kun la kanonaj evangelioj.

La rulaĵoj de la Morta Maro ne parolas pri tiu Evangelio (nek pri tiuj kanonaj), nek en ili troviĝas io simila al Evangelio de Judaso.

En tiu evangelio malfacilas kompreni kial Jesuo sin oferas ĉar neniam estas parolate pri lia amo al homaro aŭ al la “Patro” kontraste kun la kanonaj evangelioj.

Konceptoj fontantaj el tiu evangelio de gnostikuloj (= la sciantoj):

Nur la apartenantoj al la generacio de Seth posedas senmortan animon. Pro tio la sethanoj estas la plej elstaraj, dum la filoj de Adamo misekzistas.

La supera Dio estas tute fremda al la kreita homaro.

Estas montrata hororo pro la karneco: kaj tio konforme al la doktrinoj de aliaj herezuloj kontraŭ kiuj jam la apostoloj reagis.

Konstantas, krome, tendenco nei la dian originon de la antikva testamento. (Gnostikuloj ne konsentas ke la Biblio estas ankaŭ verko de homo: tio estas, ke Dio enmetiĝas, respektante tamen ties liberon, en la homan verkiston, kiu aŭtonome meditas kaj registras siajn pensojn pri la dia agado en la historio, pensoj ĉiam perfekteblaj, kaj fakte laŭ la sekvo de la tempoj vere perfektigitaj.

Ŝajnas ke estas instruate, ke Jesuo havis korpon apenaŭ ŝajnigan preniton por liberigi tiujn kiuj vivas en senmorta animo. Foje oni pensis ke Jesuo estis vera korpo sed kun mortema animo, kiu fariĝis tia kaj dia en momento de la bapto.

Ĉiukaze, Jesuo mem estas enprizonigita en tiu ŝajniga korpo, eĉ kaptita en la spiralo de morto el kiu mem devas esti liberigita por alveni al sia ĉiela loĝejo. Al tiu liberigo kontribuas Judaso Iskarioto.

Komprenantoj tion stariĝos supre la “malsuperaj diaĵoj”, kiuj tamen nun sinjoras en la mondo, kvankam Jesuo mem ne estas simila al la hebrea Dio kreanta.

Ĉu Jesuo resurektis? Foje gnostikuloj diras ke Jesuo ne povis resurekti pro tio ke la resurekto lin reenmetus en la kaptilon de morto. Jesuo mem, do bezonas saviĝon.

Kiel aktuale oni malkovris tiun tekston? Estis trovita ĉe al-Minya (Egiptujo) en 1876 papirusa manuskripto nomita ankaŭ Kodekso Tchacos (Ĉakos) el la nomo de tiu kiu ĝin aĉetis kaj konservis, skribita en sidika-kopta alfabeto (supravokaloj de la sudo), eble fare de adeptoj de la Setha grupo. Post peripetioj kaj vojaĝoj, oni ĝin restaŭris ek de 2001 ĝis 2006, kiam de National Geographic ĝin publikigis tradukita al modernaj lingvoj. Laŭ kompetentuloj, ĝi dateblas ĉe la fino de la tria jarcento pK.

El miloj, eble pli, papirusaj fragmentoj oni eltiris koheran tekston kun abundo de malplenoj. Kvankam tiu paciencege konstruita teksto ne forigas ĉiujn dubojn, oni certas ke la enhavo estas sufiĉe komprenata.

TEKSTO DE LA EVANGELIO DE JUDASO

(esperantigita de Armando Zecchin)

*(Teksto ĉerpita parte el la reto, parto el ĵurnaloj kaj multspecaj
revuoj kaj komparata kun la traduko el la originala kopto
adaptita per la franca, itala kaj angla).*

1. REVELACIO AL JUDASO.

Sekreta klarigo pri la revelacio kiun Jesuo donis konversaciante kun Judaso laŭ unu semajno, tri tagojn antaŭ la celebrado de la Pasko.

Kiam aperis sur la tero, Jesuo plenumis miraklojn kaj grandajn mirindaĵon por la savo de la homaro. Kaj ĉar iuj (marŝadis) sur la vojo de la rektanimeco dum aliaj insistadis sur la vojo de la malobservoj, estis kunvokitaj la dekdu apostolojn.

Li ekparolis kun ili pri la misteroj transmondaj kaj pri kio okazonta ĉe la fino. Ofte li ŝajnis al siaj disĉiploj ne kia li estas, sed baraktanta kiel infano.

Unu tagon Li renkontiĝis kun siaj disĉiploj en Judujo, kaj ilin trovis kunvenintaj, kaj sidantaj por ekzerci piecon. Kiam li alproksimiĝis al la disĉiploj, tiuj ĉi kuniĝis kaj sidis kaj levis dankeman preĝon super la pano, (¹kaj li) ridis.

La disĉiploj diris al (li): “Majstro, kiel vi ridas pro (nia) dankan preĝon? Ni faris tion kio justas”.

¹ La krampoj (...) entenas mankantan aŭ supozitan tekston

Li respondante diris al ili. “Mi ne ridas pri vi. Vi tion faras ne el via volo, sed kial oni kredas tion, ke via dio pro tio ricevas gloron”.

Kaj ili diris: “Majstro, estas vi la filo (...) de nia dio²”.

Jesuo diras al ili: “Kiamaniere vi min konas? Vere mi vin diras, ke nenia generacio el tiuj estantaj inter vi min konos”.

Aŭdinte tion, la disĉiploj ofendiĝis kaj koleriĝis, kaj en siaj koroj ekkomencis blafemi lian nomon.

Kiam Jesuo ekvidis, ke al en ili difektas (la kompreno, li diris): “Kial tiu ĝeno en vi estiĝis kolero? Via dio kiu estas ene de vi kaj (...) igis koleriĝantaj viajn animojn. (Ke) iu el vi, estante (sufiĉe forta) inter la homoj, elirigu la perfektan homon kaj staru antaŭ mia vizaĝo³”.

Kaj ĉiuj, “Ni havas tian forton”.

Sed iliaj spiritoj ne aŭdacas stari antaŭ li, escepte de Judaso Iskarioto. Li sukcesis stari antaŭ li, sed ne povis lin rigardi rekte al la okuloj, kaj deturnis la vizaĝon.

Kaj Judaso al li: “Mi scias kiu vi estas kaj de kie vi venis. Vi venas de la reĝolando de Barbelo. Kaj mi ne indas eldiri la nomon de tiu kiu vin sendis”⁴.

² La disĉiploj plenumas eraron, fatalan eraron konfesante ke Jesuo estas la filo de ilia dio, la hebrea kreanta dio: dio, kies misagojn Jesuo, filo de la vera Dio, venis por korekti kaj elimini.

³ Estas aludata Judaso, la sola kiu komprenas.

⁴ Estas Judaso kiu faras la ĝustan konfeson: do la vera sendinto, do la vera origininto de Jesuo estas alia Dio, ne tiu opiniata de la disĉiploj. Barbelo, nome la Patrino de ĉio, la unika transcendulo.

Sciante ke Judaso konsideradis pri ceteraj elstaraj aferoj, Jesuo diris al li. “Apartigu vin de la aliaj kaj al vi mi malsekretigas la misterojn de l’ regno. Al vi estas ebligite alveni tien, sed pro tio vi devos multe suferi. Ĉar alia vin anstataŭos por ke la dekdu povu ankoraŭ atingi la plenecon kun ilia dio⁵”.

Kaj Judaso al li diris: “Kiam (kiel) vi al mi diros tiaĵojn, kaj (kiam-kiel) la granda tago de la lumo leviĝos por tiu ĉi generacio?” Sed kiam tio estis dirita, Jesuo el li foriris.

La sekvantan matenon, tuj postan al tiuj okazintaĵoj, Jesuo (prezentiĝis) denove al la disĉiploj.

Kaj ili lin petis. “Majstro, kien vi iris kaj kion faris post kiam vi el ni foriris?”.

Kaj Jesuo diris al ili. “mi iris al alia generacio, granda kaj sankta⁶”.

Kaj la disĉiploj diris al li. “Sinjoro, kiu estas la generacio elstaranta super ni kaj pli sankta ol ni, kiu ne troviĝas en tiuj ĉi regnoj?⁷”.

Aŭdinte tion, Jesuo ridis kaj diris al ili. “Kial vi estas en viaj koroj pensantaj pri la generacio forta kaj sankta? Vere mi diras ke neniu naskiĝinto el tiu eono vidos tiun generacion, kaj ne roto de anĝeloj de la steloj regnos super ĝi, kaj neniu naskiĝinta mortema povas sin ligi al ĝi, ĉar tia generacio ne venas (...) kiu sin faris

⁵ Profetaĵo pri la estonta sorto de Judaso: laŭ ĝi la rakonto de la Agoj de la Apostoloj estas vera kroniko.

⁶ Li vizitis la spiritan regnon loĝotan de tiu generacio.

⁷ Temas, evidente, pri ideala regno kiu reflektas tiun teran. Ĉu ĉi tie okulumas la teorion de la iperuraniaj ideoj de la platona filozofio?.

(...). La generacio de tiuj kiuj estas inter (vi) elvenas el la generacio de la homaro (...) povo, kiu (...) aliaj povoj (...) por (...) kiuj) vi regas⁸”.

Aŭdinte tion, la disĉiploj, ĉiu el ili estis malkvieta en sia spirito. Ili ne kapablis vorte esprimiĝi.

Alian tagon Jesuo alvenis ĉe ilin, kiuj diris al li: “Majstro, ni vin vidis en iu (apero), ĉar ni havis longajn (sonĝojn...) nokte.

(Kaj li diris): “Kial estis vi (vi... kiam), vi iris vin kaŝi?”

Ili (diris): “(Ni jam vidis) grandan (domon kun vasta) altaro (ene de ĝi, kaj) dekdu viroj - ili estas la sacerdotoj, ni dirus - kaj iun nomon; kaj amaso da homoj atendas apud la altaro, (ĝis) la sacerdotoj (... kaj ricevis) oferojn. (Sed) ni restis atendantaj.

(Jesuo diris): “Al kio similas (la sacerdotoj)?”

Kaj ili (diris): “Iuj ...) du semajnoj, (iuj) oferas filojn, aliaj la edzinojn en laŭdo kaj humileco unu antaŭ la alia: iuj dormas kun viroj; aliaj implikiĝas en (mortigoj); kelkaj plenumas sennombrajn pekojn kaj malicaĵojn. Kaj la viroj starantaj (antaŭ) la altaro alvokas (nomon) vian; kaj en ĉiuj agoj de ilia manko, la oferoj estis plenumitaj (...).”

Post tiuj eldiroj, ili trovis kvieton ĉar jam malkvietaj.

Kaj Jesuo diris al ili: “Kial vi estas malkvietaj? Vere mi diras al vi, ĉiuj sacerdotoj kiuj staras antaŭ tiu altaro alvokas mian nomon. Kaj ankoraŭ unufojon mi diras al vi, mian nomon oni skri-

⁸ Tiu senmortema generacio ne povas estis atingita de tiu ĉi mortema.

bis sur tiu (...) de la generacioj de la steloj pere de la homaraj generacioj. (Kaj ili) plantis arbojn senfruktemajn, en mia nomo, en ia maniero kiu naskas honton⁹”.

Jesuo aldonis por ili: ”Tiuj kiujn vi vidis ricevantaj oferojn ĉe la altaro, tio estas kio vi estas. Tio estas la dio kiun vi servas, kaj estas vi la dekdu viroj viditaj. La bestoj kiujn vi vidis enkondukitaj al la oferejo, estas la multaj popoloj kiujn vi devojigas antaŭ la altaro. (...) estos kaj uzos mian nomon tiel, kaj la generacioj de popoloj restos lojalaj al li. Post li alia homo (el la fornikantoj) stariĝos, kaj alia el la mortigantoj de la filoj stariĝos kaj alia el dormantoj kun homoj, kaj tiuj kiuj abstinis, kaj ceteraĵo el la popolo je profanado kaj malliceo kaj eraro, kaj kiuj diras ‘Ni estas kiel la anĝeloj’; ili estas la steloj kiuj kondukas ĉion al ties finiĝo. Ĉar al la homaraj generacioj estis dirite ‘Vidu, Dio akceptis vian oferon el la manoj de sacerdoto, aŭ de administranto de eraremo’. Sed estas la Sinjoro, la Sinjoro de la universo la ordonanto. En la lasta tago ili estos elmetitaj al la honto¹⁰”.

Jesuo diris (al ili): ”Ĉesu el oferaĵo (...) kiun vi tenas (...) sur la altaro, ĉar ili estas supre de viaj steloj kaj viaj anĝeloj, kaj jam atingis la finon tien. Tiel, vi faru ke ili estu antaŭ vi, faru ke iru (...) la generacioj (...). Bakisto ne povas nutri tutan kreaĵaron subĉielan. Kaj (...) al ili (...) al ni kaj (...).

⁹ Travidigas ke ankaŭ en tiu ĉi evangelio, kiel en aliaj gnostikaj, Jesuo okupas la pozicion kaj funkcion egalan al tiu de supera Eono.

¹⁰ La dekdu estas avertitaj: vi adoras dion falsan kaj mensogofontan. Liaj adorantoj profitas mian nomon... Ŝajnas, ke la apostoloj volas lerni nenion kaj eĉ ili male estas flankemetitaj, kvankam la profita uzado de la nomo de Jesuo.

Jesuo diris: “Ĉesu kontrasti kun mi. Ĉiu el vi havas sian stelon (...), kiu venis (...) por la arbo (...) de tiu eono (...) portempe (...) sed li venis por akvumi la paradizon de la Dio, kaj la generacion, kiu daŭrigos, ĉar li ne profanos (la fluon de la vivo) de tiu ĉi generacio, sed (...) laŭ la tuta eterneco¹¹”.

Judaso diris (al li: “Rabi), kian fruktospecon produktas tiu ĉi generacio?”.

Jesuo diris: “La animoj de ĉiu homara generacio pereos. Sed kiam tiu popolo estos pasinta la tempon de la regno kaj la spirito ĝin forlasas, iliaj korpoj mortos, sed iliaj animoj vivos, kaj ili estos levitaj¹²”.

Judaso diris. “Kaj kion faros la cetero de la homaraj generacioj?”.

Diris Jesuo. “Ne sencas ke vi semu sur (roko) kaj poste kolektu fruktojn. (Tia) estas ankaŭ la vojo (la korupta) kaj koruptebla *Sofia* (...) la mano kiu kreis la moralan popolon, tiel ke ties animoj supreniros al la eternaj regnoj superaj. (Vere) mi al vi diras, (...) anĝelo (...) potenco kapablos vidi ke (...) tiuj al kiu (...) sanktaj generacioj (...)”¹³.

¹¹ Ĉiu havas sian stelon. Ĉu la verkanto inspiriĝis el TIMEO de Platono?

¹² Evidentas eĉ ĉi tie, ke laŭ tiu gnozo enmondigis du tipoj de homoj, iuj definitive mortemaj, aliaj kun animoj senmortaj, nome entenantaj dian fajreron enprizonigitan kaj do liberigendan.

¹³ En la gnostikaj tradicio kaj mitordo SOFIA (Saĝeco) erare falis sed estis rehabilitita al la dia digneco kaj ĝia filo estas la Demiurgo, nome la stulta Saklas kaj sangavida Yaldaboath, kiuj kreis la homojn. Sofia do korupteblas laŭ Judaso.

Tion dirinte, Jesuo foriris.

Judaso diris: “Same kiel vi aŭskultis ilin ĉiujn, nun aŭskultu min. Ĉar mi havis grandan vizion”.

Aŭdinte tion, Jesuo ridis kaj diris: “Via dektria¹⁴ spirito, kial penas tiom? Sed parolu, kaj mi havos paciencon kun vi”.

Kaj Judaso diris al li: “En la vizio vidis min mem, dum la dekdu min ŝtonigis kaj mi persekutis (kruele). Kaj mi venis al la loko kie (...) post vi. Mi vidis (domon), kaj miaj okuloj ne kapablis (ĉirkaŭvidi) ties amplekson. Grandaj personoj ĉirkaŭadis tiun domon, kaj tiu domo (havis) tegmenton frondan, kaj en la mezo de la domo staris (homamaso....) kaj mi diradis: ‘Majstro, konduku min kune kun tiu popolamaso¹⁵’.

(Jesuo) respondis kaj diris. “Ne eĉ unu el mortema naskiĝo indas eniri la domon de vi viditan, ĉar tiu loko estas rezervita al la beatuloj. Nek suno nek luno regos tie, sed la sanktuloj ĝin loĝos por ĉiam, en la regno eterna kun la sanktaj anĝeloj. Vidu, mi klarigis al vi la regnajn misterojn kaj vin instruis pri la eraro de la steloj, kaj (...) sendi (...) sur la dudek eonojn”.

Judaso diris. “Majstro, ĉu mia semo estas sub la povo de la potenculoj¹⁶?”

¹⁴ Judaso estos la dektria apostolo

¹⁵ Judaso sin vidas kontraŭata de la aliaj, kiuj poste ĝojos (eĉ se ne prizorgis) pri lia sinmortigo. Li sin vidas jam en ĉiela loĝejo kaj volus tie pluresti. Sed li devas, antaŭe, plenumi sian taskon.

¹⁶ Judaso enketas pri sia destino. Tiuj potenculoj estas la arkontoj, la potencoj de tiu mondo kiuj kunlaboras kun la Demiurgo.

Jesuo respondis kaj diris: “Venu, ke mi (...), sed ke vi iom suferos kiam vi vidis la regnon kaj tutan sian generacion”.

Aŭdinte tion, Judaso diris al li: “Kia bonaĵo estas tiu kiun mi ricevis? ke vi forigis min el tiu generacio”.

Jesuo respondis kaj diris. “Vi estos la dektria, kaj estos malbenita de la aliaj generacioj, kaj alvenos regi super ili. En la lastaj tagoj ili malbenos vian ascendon al la generacio sankta”.

Jesuo diris: “(Venu), ke mi povu diri al vi (sekretojn kiuj) neniuj iam ajn vidis. Ĉar tie ekzistas regno granda kaj senlima, kies vasteco nek unu el la generacioj de anĝeloj vidis, (kie) estas (unu) la Spirito granda nevidebla,
*kiun neniuj anĝeloj vidis,
nek aspiro de l' koro iam komprenis,
kaj kiu neniam ricevis nomon*”.

Kaj aperis luma nuboj. Kaj li diris: “Ke anĝelo estiĝu kaj estu mia servisto¹⁷”

Granda anĝelo, la iluminita dia singenerinta, eliris el la luma nuboj. Pere de li, aliaj kvar anĝeloj venis estiĝi de alia nuboj, kaj ili fariĝis servistoj de la anĝela singenerinto. Kaj la Singenerinto diris: “Ke (...) estiĝu (...)” kaj tiu ensaltis en la ekziston (...). Kaj li (kreis) la unuan lumamason por regi super ĝi. Li diris: “Anĝeloj venis en ekziston por lin servi, kaj miriadoj senfinaj venis en ekziston”. Kaj li aldonis: ”(faru ke) eono iluminita venu

¹⁷ Jesuo instruas Judason pri nova kosmologio, la Spirito kaj la Memgenerinto.

en ekziston“, kaj tiu estiĝis. Li kreis la duan luman fonton (por) regi super ĝi, kune kun miriadoj da sennombraj anĝeloj per fari servon. Tiu estas la maniero laŭ kiu li kreis la ceteron de la eonoj iluminitaj. Li tiujn ĉi igis regantoj super tiuj, kaj kreis por ili miriadojn da anĝeloj por ke tiuj ĉi ili asistu¹⁸”.

2. ADAMAS

”Adamas estis en la unua luma nubo kiun neniam anĝelo el tiuj nomataj ‘dio‘ vidis. Li (...) kiu (...) la bildo (...) kaj je simileco de (tiu) anĝelo. Li efikis por ke la nekoruptebla (generacio) de Setho aperu (...) la dudek (...) la dudekkvar (...). Li efikis por ke la sepdekdu lumfontoj aperu en la nekorupta generacio, laŭ la volo de la Spirito. La sepdekdu lumfontoj efikis ke la tricentsesdek lumfontoj aperu en la nekoruptebla generacio, laŭ la volo de la Spirito por ke ilia nombro estu kvin por ĉiu.

La dekdu eonoj de la dudekkvar lumfontoj konstituas ilian patron, kun ses ĉieloj por eono, tiel ke estas sepdekdu ĉieloj por sepdekdu lumfontoj, kaj por ĉiu (de tiuj kvin) firmamentoj, (ĝis nombri) tricentsesdek (firmamentoj...), Al ili estis donita aŭtoritateco kaj granda roto da anĝeloj (sennombraj), por la gloro kaj

¹⁸ Ĉio lasas kredi, ke tiu singenerinto (ĉu nekredito?) identas al la difilo kiel akiratas ankaŭ de aliaj gnostikaj tekstoj. Tiu singenerinto kreas lumfontojn (identigeblajn kun lumkorpoj kaj inteligentaj estaĵoj), eonojn kaj anĝelojn kaj havas la superan prerogativon de Dio: la gnostikuloj en tio sekvas la ortodoksan eklezion kaj la paŭlajn leterojn kaj la skribojn de Johano. Batalantoj kontraŭ la grandan eklezion, al ĝi alflankiĝas ĝuste en ĝia precipa dogmo.

adorado, (kaj post tio ankaŭ) virgaj spiritoj por la gloro (kaj por la adorado) de ĉiuj eonoj kaj la ĉieloj kaj ties firmamentoj¹⁹”.

3. *KOSMO, KAOSO KAJ MALSUPERA MONDO*

“La multo de tiuj malmoraluloj estas nomata kosmo aŭ ties perdiĝemo - ĉe la Patro kaj ĉe la sepdekdu iluminitoj (= iluminitaj lumfontoj) kiuj staras kun la Singenerinto kaj ties sepdekdu eonoj. En li la unua homo estiĝis kun siaj nekorupteblaj potencoj. Kaj la eono kiu aperis dum lia generacio, la eono kie staras la nuboj de la kono kaj la anĝelo, estas nomata (...) El. (...) eono (...) post tiu (...) diris: ‘ke dudek anĝeloj venu al ekzisto (por) superregi sur la kaoso kaj l’(infero). Jen vidu!’”. Kaj el la nuboj aperis (anĝelo) kun la vizaĝo ekfulma je fajro kaj videble malpura je sango. Nebro estas ĝia nomo, kiu indikas “ribelulon”, por aliaj ĝi estas Yaldabaoth. Sed krome anĝelo, Saklas, eliris el la nubo. Nebro²⁰ kreis entute ses anĝelojn - kaj Saklas simile - por ili estas servistoj, kaj tiuj generis dekdu anĝelojn en la ĉieloj, kaj ĉiu el ili ricevis eron en la ĉieloj²¹”.

4. *APOSTOLOJ KAJ ANĜELOJ*

“La dekdu arkontoj parolis kun la dekdu anĝeloj: “Ke ĉiu el vi (...) kaj ke ili (.....) generacio (...) anĝeloj”:

¹⁹ Adamas estas Adamo, ĉu tera ĉu ĉiela personulo (ĉi tie videblas sintonio kun la filozofio platona), en ties supera spirita esenco, paradigma de homa eono en la levita mondo.

²⁰ Alia nomo de supera personulo de la gnostika mitologio. Ĉikaze temas pri kreinto

²¹ Vere mizeruloj tiuj diuloj emaj al eraro.

La unua estas Seth, kiu estas nomata Kristo,
la (dua) estas Harmarhoth, kiu estas...
La (tria) estas Galila.
La kvara estas Yobel.
La kvina estas Adanaios.

Ili estas la kvino regintaj la malsuperan mondon, kaj precipe la kaoson.

5. KREO DE LA HOMARO

“Tiam Saklas diris al siaj anĝeloj: “Ni kreu homon laŭ nia similo kaj bildo”. Kaj ili faris Adamon kaj lian edzinon Evan, kiu inter la nuboj estas nomata Zoa. Ĉar tra tiu nomo ĉiuj generacioj serĉas la homon, kaj inter ili ĉiu nomas la virinon per tiu nomo. Nun. Saklas ne (...) forprenis (...) la generaciojn (...) tiu (...). Kaj (la arkonto diris): ”vi vivos longatempe, kun viaj filoj²²”.

6. JUDASO PRIPETAS PRI LA DESTINO DE ADAMO KAJ DE LA HOMARO

Kaj Judaso diris al Jesuo. “(Kiom) daŭras la tempa longo kiun travivos la homa kreaĵaro?” Jesuo diris: “Kial vi enketas pri tio, kiom Adamo, kun sia generacio, vivis la longon de sia vivo tie kie li ricevis sian regnon, kun longa vivdaŭro paralela al tiu de sia arkonto?²³”

Judasoo diris al Jesuo: “Ĉu la spirito de la homo pereas?”

²² En diversaj gnostikaj tekstoj estas dirate, ke Adamo estis kreita laŭ bildo de Dio kaj laŭ bildo de la arkonto. Komparu kun Gn 1,26.

²³ En la obskureco de tiuj vortoj ŝajnas kompreni ke Judaso volus scii aferojn negravajn pri Adamo.

Jesuo respondis: “Tio okazas pro la motivo, ke Dio ordonis al Mikaelo doni la spiriton al la personoj kiel pruntaĵon por ke ili povu liveri servon, sed la Granda ordonis al Gabrielo doni spiritojn al la granda generacio sendependaj de arkontoj super ili, nome spirito kaj animo. Tial, (la ceteraj) animoj (.....)²⁴”.

7. JESUO PRIDISKUTAS LA DETRUON DE LA AĈULOJ KUN JUDASO

“(...) lumo (.....) ĉirkaŭ (...) ke (...) spirito (kiu estas) en vi loĝas en tiu (karno) inter la generacioj de la anĝeloj. Sed Dio decidis, ke la kono estu donita al Adamo kaj al la siaj, tiel ke la reĝoj de la kaoso kaj de la infero ne superregu super ili”.

Judaso diris al Jesuo: “Tiel, kion faros tiuj generacioj?”.

Jesuo diris: “Vere mi diras, por ĉiuj ili la steloj kondukas la aferojn al plenumiĝo. Kiam Saklas atingas la finon de la daŭro de la vivo koncedita, la unua stelo aperos kun la generacioj, kaj ili kompletigos kion ili diras, ke mem intencas fari. Tiam ili fornikos en mia nomo kaj mortigos siajn filojn, kaj ili (.....) nomo mia, kaj li (...) via stelo super la dek(tria) eono²⁵”.

Kaj, post tio, Jesuo (ridis).

(Judas) diris: “Majstro kial vi ridas pri mi?”.

²⁴ Se eblas probable interpreto: Mikaelo kreis specon de animoj - mortemaj - dum Gabrielo alian specon - nemortemaj.

²⁵ Ĉu metaforo por montri la malmoralajojn kunigitajn kun la eraroj de la ortodoksa estraro?

(Jesuo) respondis (kaj diris): “Mi ne ridas (pri vi, sed pri la eraroj de la steloj, ĉar tiuj ses steloj vagas supre kun tiuj kvin batalantoj, kaj ĉiuj estos detruitaj kun iliaj kreaĵoj”.

8. JESUO PAROLAS PRI BAPTITOJ KAJ PRI LA PERFIDO DE JUDASO

Judaso diris al Jesuo: “Vidu, kion faros la baptitoj je via nomo?” Jesuo diris: “Vere mi diras (al vi), tiu bapto (...) mia nomo (...) al mi. Vere mi diras al vi, Judaso, (tiuj kiuj) oferas al Saklas (...) Dio (...) ĉio tio kio estas la malbono”. Sed vi estos inter ili. Ĉar vi oferos la homon kiu min vestas²⁶.

**Via koro jam leviĝis,
via kolero jam ascendis,
via stelo sin montris lume,
kaj via koro estiĝis (...)²⁷.**

“Vere mi diras (...) via lasta (...) fariĝas (.....), ekde estos detruita. Kaj tiam bildo de la granda generacio de Adamo estos levita, ĉar jam de antaŭ ol la ĉielo, ol la tero kaj anĝeloj, tiu generacio, kiu devenas de la eternaj regnoj, ekzistas. Nun vidu, al vi estis dirate ĉio. Levu la okulojn kaj rigardu la nubon kaj la lumon en ĝi, kaj la stelojn ĉirkaŭe. La stelo kiu indikas la vojon estas la via²⁸”.

²⁶ nome Jesuo.

²⁷ Judaso jam pretiĝas al la ŝajniga perfido kiu savos la veran personecon de Jesuo mem.

²⁸ Judaso estas definitive konsekrita al sia destino.

Judaso levis la okulojn kaj vidis la nubon luman, kaj eniros en ĝin. Kaj tiuj sur la tero aŭdis voĉon venantajn el la nuboj, diranta, (...) granda generacio (.....) bildo (.....).

10. KONKLUDO: JUDASO PERFIDAS JESUON²⁹

(...) Iliaj elstaraj sacerdotoj plendis pro tio ke (li) eniris la ĉambron de la gastoj por sia preĝado. Sed iuj Skribistoj estis tie, por prudente observi cele lin aresti dum la preĝado. Ĉar ili timis la popolon, estante li konsiderita profeto.

Fakte ili alproksimiĝis al Judaso kaj diris: «Kion faras vi ĉi tie? Vi kiu estas disĉiplo?».

Judaso respondis al ili same kiel ili volis. Kaj li ricevis monon kaj lin transdonis al ili³⁰.

²⁹ Lin liverante al la Romianoj.

³⁰ La finiĝo de Judaso, funde, ne estas tragedio. Pere de ĝi, fakte, li fariĝos la dektria apostolo ĉar forigita de sia legitima posteno el inter la nekomprentantoj.